# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 11 Novembro, 2017

## Feliĉan Dankan Tagon kaj Zamenhofan Tagon 2017

*Dimanĉe, la 12an de Novembro, 4 estraranoj de la E-societo kunsidis en restoracio Smoque kaj faris kelkajn gravajn decidojn: La Zamenhofa Festo okazos dimanĉe, 17an de Decembro 2017, inter tatmezo kaj 4 ptm en Ronald Williams Library laŭ la adreso: 5500 Saint Louis Ave., Chicago, IL 60625. La loko, situanta en la mezzo de NEIU kampuso apud Bohemia Tombejo inter stratoj de N. Pulaski, Foster, Bryn Mawr kaj St. Louis, estas atingebla per bus-itineroj n-roj 53, 82, 92. Apudas Kimball stacio de Bruna Linio. Parkejo estas senpaga. $20 de persono.*

*Alia gravaĵo: dum la festado estos inaŭgurita Ekspozio dediĉita al Zamenhofa jaro. Vic-prez. Randio pruntedonis necesan monsumon por produkti la afiŝojn. Koran dankon, s-no Randio, pro la helpo!*

## De la Lasta Societ-Kunsido *de Les Kordylewsi*



Kiel ofte okazis dum la lastaj kunsidoj kaj nun venis novulino Nancy (*vd la foton, kie ŝi sidas kune kun sekretariino Tina*). Ankaŭ okazis reta videokonferenco kun Miriam.

Eric kaj Randio esprimis emon partopreni nian renkontiĝon dimanĉe en Novembro. Eric konas restoracion **Smoque** kaj entuziasme konfirmis, ke ne ĝenas lin viandeco de la loko, nur se ili almenaŭ servas bieron – li volonte partoprenos (pri tiu ĉi evento legu malsupre).

Venis materialoj el Tanzanio, kie oni tie fondis hospitalon, nomita je honoro de d-rino Gertrude Novak. Estas fotoj, kiuj bedaŭrinde ne bonkvalitas por **Saluton!**, sed la mencio pri tiu fenomena afero indas en nia bulteno. Mi havas la sendaĵojn, kiujn originale ricevis Randio.

Ĉiuj ŝatis la ideon de la planata Zamenhofa Ekspozicio. Ni diskutis, ĉu ne produkti malpli ol ĉiuj 18 afiŝoj por malaltigi la kostojn. Ni diskutis kiuforme konfirmi la ricevotan monon al la donanto en Decembro post ni finos la projekton. Ankaŭ ni diskutis, de kie potempe ricevi la monon por komenci la projekton, ĝis la donanto povos repagi tuton al ni. Randio entuziasme konsentis transpreni la taskon de la mendo de la afiŝoj kaj provizore financos tion, esperante ricevi poste la spezitan monon. Les konstatis, ke la mono estas garantiita de la Pola Konsulejo en Ĉikago ($5,000), kiun la donanto postulas, ke ni spezu entute, kaj ke ni eldonu la kvitancon (invoice) kun detalaj kategorioj laŭ la projekto. Les sendos la posedatajn grafikaĵojn al Randio por ke li povu mendi la afiŝojn, kvankam ni devas detale aprobi, kio estos farita kaj per kiu firmao.

Ni diskutis, kiel eblus kombini Zamenhofan Feston kun la ekspozicio. Ĉar la senpaga ĝisnuna salono ne plu estas uzebla, ni havas du eblecojn: (a) okazigi la Feston en iu restoracio (ĉina malmulktekosta bufedo?) en aparta ĉambro kun multege da manĝo paginda pere de ĉiu partoprenanto – sen alkoholaĵoj, aŭ (b) lui iun salonon kaj aparte mendi alporton de manĝo (catering). Ni nepre devas tion decidi, konsiderante, ĉu dum la Festo estos sufiĉe da konvena loko por la ekspozicio de la afiŝoj de la Zamenhofa ekspozicio.

## E-Prezentado en Ternopilo *de Viktor Payuk*




Prezentado de la E-libro "Verda Antologio" okazis en mia gepatra urbo Ternopilo: ĝi estas unua, poezia parto, kiu enhavas poemojn de 33 famaj E-poetoj de XIX – XXI j.j. La eventon filmigis du lokaj televid-kanaloj, multaj retaj amaskomunikiloj poste raportis pri ĝi. Dum la prezentado V. Pajuk, redaktoro de "Saluton!" skize rakontis pri la historio de IL en Ternopil, Ukrainio, ankaŭ – pri la E-literaturo, pri pasintoj eldonoj kaj pri planoj por estonteco. Jen estas ligilo al video-filmeto pri la evento:

https://www.youtube.com/watch?v=XGVkZRwcpNU&feature

# Bagateloj

*Redaktante la unuan Esperantan gazeton **La Esperantisto**, Ludoviko Zamenhof prizorgis ankaŭ la rubrikon **Bagateloj**. Evidente li aperigis en ĝi tiujn ŝercojn kaj anekdotojn, kiujn li mem ŝatis. Legu do, pri kio ridis la tridekkelk-jara Doktoro Esperanto en la foraj jaroj 1890aj.*

**Principo.** Luigantino de ĉambro: Antaŭ ol Vi enloĝiĝas en mia ĉambro, mi devas al Vi rimarki, ke mi amas, ke oni akurate pagu la luan pagon. – Studento: Tio ĉi estas ankaŭ mia principo; aŭ akurate aŭ tute ne!

**Tro granda postulo.** – For! Al sanaj kaj fortaj mi almozon ne donas. – Kiel Vi volas; pro Viaj kelkaj centimoj mi al mi piedon ne rompos.

**Teruraj infanoj.** Onklino parolas kun malgranda nevo, kiu ĵus venis el la lernejo: – Nu, ĉu vi lernis aritmetikon? – Certe! – Kion do vi lernis? – Deprenadon. – Aha! Sekve se mi diros al vi, en kiu jaro mi naskiĝis, ĉu vi povos diri, kian aĝon mi havas? – Oho! Tiujn grandajn nombrojn ni en la lernejo ankoraŭ ne lernis!

**Memfarita homo.** "Jes miaj sinjoroj", predikas sinjoro A., trinkante sian glason en gaja kolegaro, "mia devizo ĉiam estis: "La homo mem devas ĉion al si ellabori". Kiu meme al si helpas, al tiu ankaŭ Dio helpas! La 50,000 frankojn, kiujn mi posedas, neniu al mi donacis kaj ankaŭ de neniu mi ilin heredis, – ne, mi mem ilin gajnis en la loterio!"

**Bonigo.** Fianĉino: Diru, ĉu estas vera tio, kion mia patrino al mi diris? – Fianĉo: Kion do? – Fianĉino: Ke vi edziĝas je mi, ĉar mi poste havos grandan sumon da mono. – Fianĉo: Sed, mia infano, kontraŭe! Estus al mi eĉ pli agrable, se vi ĝin havus jam nun.

**Kiu scias?** – Kian doton do havas Via juna edzino? – Mi ne scias; kiam mi antaŭ la edziĝo demandis pri tio ĉi mian bopatron, li fariĝis malĝentila. – Kaj post la edziĝo? – Hm, tiam li fariĝis ankoraŭ pli malĝentila.

**Kuraĝulo.** "Sinjoro!", krias unu maljuna fraŭlino el la vagono al unu sinjoro, kiu volas tien eniri: "tie ĉi estas la vagono por sinjorinoj!". – "Ho!" respondas la sinjoro, enirante kaj dismetante siajn pakaĵojn, "mi ne estas timemulo!'

**Apetito.** Kial vi petas almozojn? – Ĉar mi volas manĝi, mia bona sinjoro. – Kial do vi ne laboras? – Ha, kiam mi laboras, mi ankoraŭ pli volas manĝi.

**Niatempa amo.** Mi Vin amas… – Sed mi estas malriĉa. – Pardonu, Vi ne lasis min elparoli ĝis la fino… mi amas Vin ne tiel, por edziĝi je Vi… – Ha, ha, ha! Mi volis nur elprovi Vin, mi havas grandegan kapitalon! – Pardonu, Vi tamen ne lasis min fini; mi amas Vin ne tiel, por edziĝi je Vi pro Via mono.

**Zorgo.** Vi estas tiel malgaja, al vi kredeble faras zorgojn viaj kreditoroj? – Jes, miaj kreditoroj estontaj, ĉar mi ĉiam zorgas, de kiu mi nun povos ankoraŭ prunti.

**Diferenco.** Kia diferenco estas inter la unua amo kaj la lasta? – Pri la unua amo oni ĉiam pensas, ke ĝi estas la lasta, kaj pri la lasta oni ĉiam estas konvinkita, ke ĝi estas nur la unua.

**El la historio.** A: Kial Hanibalo iris trans la Alpojn? – B: Ĉar tiam la tunelo ne estis ankoraŭ preta.

**En la juĝejo.** Juĝanto: Kiel oni vidas el la preparaj aktoj, la ŝtelado estas via profesio! Juĝato: Kion do vi volas, sinjoro juĝanto, ke mi ŝteladu por *plezuro*?

**Telegrama stilo.** Juna edzino naskis filinon. La edzo volis sciigi la patron de sia edzino pri tiu ĉi fakto, aldonante, ke la fakto havis lokon en la sepa horo matene kaj ke poste per letero li skribos pli detale. Li telegramis: "Hodiaŭ matene sepa filino naskita. Poste pli".

**La pafanto.** Leŭtenanto: "Ni supozu, ke la malamiko staras tie ĉi antaŭ la arbo. Laŭ la komando "tri" vi ekpafos sur la arbon. Sekve atentu: unu-du-tri!.. Ha, mallerta urso, vi pafis ja preter la arbon!" – Rekruto: "Nu, kion do ĝi malutilas, sinjoro leŭtenanto? Kiam la malamiko efektive venos, tiam ja certe ne ĉiuj staros *antaŭ* la arbo, kelkaj staros ankaŭ *apud* la arbo!"

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn
Membro – Hans Becklin

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website. Gifts are welcome also.


Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

Venonta kunsido okazos 7:00-9:00pt laŭ en la Centra Biblioteko sur la 6-a (sesa) etaĝo norda stud-ĉambro: 400 S. State St., Ŝikago.

**28-an de Novembro** – Lastaj E-eventoj en la mondo (inf. Araneo)

**17-an de Decembro** – Zamenhofa Tago en la mezzo de NEIU kampuso



# ESF Nomis Novan Ĉefdirektoron

Esperantic Studies Foundation (ESF) nomis Charles O. Mays kiel sian novan Ĉefdirektoron. Lia antaŭulo Joel Amis eksiĝas por kompletigi siajn magistrajn studojn pri religio, survoje al pastriĝo en la Anglikana Eklezio de Kanado.

Laŭprofesie Chuck Mays estas elektra inĝeniero kaj projektogvidisto. Li diplomiĝis pri elektra inĝenierado ĉe la Nord-Karolina Ŝtata Universitato. En la daŭro de sia kariero, li pasigis longajn periodojn eksterlande, inkluzive unu jaron en Honkongo kaj dek jarojn en Aŭstralio. Lige kun sia profesio, li vaste vojaĝis en Eŭropo kaj Azio kaj ankaŭ vizitis Sud-Amerikon kaj Afrikon.

Chuck jam kelkajn jarojn aktivas en la aferoj de ESF. Interalie, li aranĝis multjaran sidejon por NASK, la Nord-Amerika Somera Kursaro, kiun ESF organizas ĉiujare, ĉe Universitato William Peace en Raleigh, Nord-Karolino. Li elektiĝis kiel estrarano de la Fondaĵo en 2013.

"Ni estas ja feliĉaj, ke ni trovis tiel multflanke spertan homon por okupi la streĉan postenon de Ĉefdirektoro," diris Humphrey Tonkin.

Per tiu nova enoficigo, la centro de agado de la Fondaĵo transiros el Montrealo, Kanado, al Raleigh, Nord-Karolino.